



TEA-BULTENO

16^A JARO

JULIO - AŬGUSTO 2013

NUMEROJ 7-8

En Italio la plej granda parto de la politikistoj ne batalas por projektoj, sed por propraj avantaĝoj.
Indro Montanelli (1909-2001) ĵurnalisto, eseisto, komediverkisto

שלום

Shalom, khaver yakar shelì!

Israelo, magia lando, la tero de l' Profetoj kaj de Kristo, kies idealoj pri justeco, paco kaj amo inspiris la tri plej grandajn universalajn religiojn: Hebreismon, Kristanismon kaj Islamon. Por Judoj ĝi estas la Biblia lando, simbolo de pasintaj gloroj kaj espero pri pli justa estonteco. Por Kristanoj ĝi estas la loko kie vivis kaj suferis Jesuo, anoncante la Ĉielan Regnon. Por Islamanoj la sanktega tero de kie Profeto Mohamedo suprenflugis en la ĉielon.

Lando de l' Espero, Lando de Dio, Tero de Kredo kaj Amo, kie tamen malfacilas vivi en paco, en daŭra paco.

En Israelo oni mergiĝas en la riĉecon kaj variecon de la tradicioj, oni malkovras kredojn, ritojn, kaj arkitekturojn kiuj mem parolas kaj atestas pri la diversaj religioj.

Jes, mia celo en pasinta aprilo estis ĝuste la Sankta Tero, tiu orienta lando etendiĝanta laŭ marbordo mediteranea limanta norde kun Libano, kies pinto plej suda tuŝas la Ruĝan Maron. Kial? Por partopreni en la 7^a Azia Kongreso de Esperanto!

Ĉijare, en Esperantujo, du estis aparte allogaj kongresoj: UK en Islando kaj AK en Israelo. Longatempe la nomoj de la du landoj turmentis min dum sendormaj noktoj, kiam mi pensadis kiun el la du elekti, kaj fine, post trafoliumado de gvidlibro pri Israelo kaj virtuala vagado en Jerusalemo kaj Akko kaj Masado kaj en Timna... foriĝis ĉia ajn dubo: ĝi estu mia vojaĝcelo!

Do, aliĝo, pago, kaj finfine fluga tago!

Tel-Avivo, la "printempa monteto", bonvenigas nin per siaj kontrastoj de malnovo, novo kaj moderno. Renkontiĝo kun esperantistoj jam sentigas min hejme kaj ekde tiu momento ekas la 'Israela aventuro'.

Ankoraŭ nun, post jam dumonata tempopaso, svarmas en la kapo plej diversaj impresoj, memoroj, sentoj. Pri konkludoj oni legu fine de ĉi raporteto kaj pri ĉio legota ne misrezonadu aŭ miskomprenu min.

Staru, staru; atendu, atendu; malĉeestas kelkaj homoj. Rendevuo je la 9-a akurate! Ja bone, mi estas, sed kie la aliaj? Iu estas ankoraŭ matenmanĝanta! Ĉu ankoraŭ?!? Ĉi estas butikumanta! Ĉuuu?! Kaj ni staras kaj staras, kaj atendas kaj atendas. Kuru, kuru! Jam temp' està - sed ne plu estas tempo! Neee, ni ne vizitos tion, ĉar ni malfruis. Ĉu mi malfruis? Ĉiam akurate kaj ĝustatempe mi alvenis - diru tion al la aliaj! Urĝu, urĝu aŭ ni maltrafos la celon! Kuru, kuru, aŭtobuso ne atendas nin! Kaj la suno ridegis alte en la blua ĉielo, frapante niajn kapojn per ardaĵ radioj! Rapide fotu, ne estas tempo! Venu, venu, komuna fotado: ankoraŭ du-tri-kvar-kvin fotiloj atendas fotemulon!

Estas ŝabato: nenio funkcias, nek aŭtobusoj nek trajnoj nek kafoaparatoj nek monŝanĝejoj nek restoracioj, kaj tio ĝis morgaŭ vespere! Ho, ĉu eblos manĝi? Eble! Ho, kiel bela ĉi tio - kio estas? Mi ne scias, mi ne estas profesia ĉiĉerono! Do, kaj nun, kio sekvas en la programo? Mi ne scias, ĉu ne estas ie skribite? Nun ni iros tagmanĝi. Kie? Mi ne scias, ie! Ne plu estas tempo, tro longe ni sidis en manĝejo, ni pli rapidigu la viziton! Sed pli rapida ol ĉi tiel ne eblas, ja ne ĉiuj estas kurkonkursantoj! Perd-

iĝis virino! Diable, kien ŝi iris! Kion ni faru? Atendu, atendu! Mi forgalopu! Poŝtelefono ne funkcias, malŝaltita estas ĝi! Ŝvito, timo, forta korbatado - nu, jen ŝi! Temis pri miskompreno: ĉu eĉ Esperanto misfunkcias ... en Israelo?

Kaj nun 'For la bataliloj!' Ho, pardonu min, mi intencis diri: 'For la ŝercoj!' kaj mi rakontu pli serioze!

De Tel-Avivo al Jafo, al antikva Jafo, kiu laŭ la Malnova Testamento estis fondita de Jafeto, unu el la filoj de Noa: aparte grava haveno dum la regado de Salomono, en la periodo kiam estis konstruita la Unua Templo en Jerusalemo. Blankaj bastionoj, altaj palmoj kaj mirigaj panoramoj al maro, mallarĝaj stratoj, labirintecaj, en kies kaŝitaj anguloj troveblas spuroj bibliaj, kia la Domo de Simono la Taniŝto: tie vivis Sankta Petro post la mirakla revivigo de Tabitha.

Hajfo, la urbo kie plej pace kaj tolereme kunvivas hebreoj kaj araboj kaj kie troviĝas la monda centro de Bahaismo, religio kiu predikas i.a. la mondpacon, unuecon de la homaro, egalecon de viroj kaj virinoj, eliminon de ĉiaspecaj antaŭjuĝoj kaj bezonon je universala helplingvo kaj al kiu konvertiĝis Lidja Zamenhof en 1926. Eksterordinara loko el blankaj sanktejoj kaj monumentoj kaj kun kaskado da 19 terasaj ĝardenoj, smeraldverdaj, puntitaj per bunta floraro kaj arboj perfekte tonditaj. Pli apude al la maro, jen la preĝejo *Stella Maris*, kie estas alia grava religia spuro: la groto de Profeto Elija.

Akko, havenurbo situanta en strategia pozicio, povas fieri pro sia eminenta historio: unuafoje oni menciis ĝin en iuj sanktegiaj egiptaj tekstoj (2040 aK) kiel potencon Ŝtato-urbon. Ĉirkaŭita

per impona defendmurego, ĝi ĉefe famas pro la subtera krucmilitista urbo, en kiu spektaklas serio de salonoj, kun krucvolba plafono, situantaj 8 metrojn sub la marnivelo. Tie troviĝis la Kavaliraj salono kaj manĝejo, tuneloj, tre probable pasejoj por kaŝe atingi la havenon, kaj malsanulejaj ĉambregoj.

Sed ne nur historiaj kaj arkeologiaj ejoj troviĝas en Israelo, tie la naturo vere faris sian plejan eblon por fascini la homojn per siaj unikaj prezentoj. Unu el tiuj videblas tute norde, landlime kun Libano: temas pri Rosh Hanikra. Promontoro malkvietiga, impresa, kie blankaj rifaroj, krute vertikalaj, mal-supreniĝas al la maro kaj ondoj bruantaj kaj senfine ŝaŭmantaj frakasiĝas kontraŭ la bordon, jam de jarmiloj elfosantaj la plurajn grotojn, kien la maro eniras kreante altajn ŝprucojn, en foje larĝaj foje mallarĝaj funelformaj faŭkoj. El tiu blanka kalka kaj gipsa klifaro tie kaj tie elstariĝas nigraj, glimaj, vitrecaj buletoj aŭ longaj strioj el ege malmola ŝtono, simila al obsidiano. Vere senspiriga naturspektaklo.

Tion sekvas Nazareto, la urbo kie Jesuo pasigis sian infanaĝon, Kafarnao, la Galilea Lago, kie en 1986 estis trovita fiŝkaptista barko longa 8,2 metrojn, pri kiu sciencistoj certigas ke ĝi navigis ĝuste en la Jesua periodo. En Nazareto, la Preĝejo de Anoncado kun la groto kie Maria ricevis de la Anĝelo la feliĉan anoncon pri sia baldaŭa patriniĝo; Kafarnao, kie troviĝas la domo de Sankta Petro kaj sinagogo de la 2a jc pK kaj kie Jesuo pasigis la plej signifan periodon de sia predikado; Tabgha kaj la Preĝejo pri Multobligado de Panoj kaj Fiŝoj, kun mirindaj mozaikoj. En ĉiuj ĉi lokoj ligitaj al la vivo de Jesuo la aero parfumas je mistero, trempiĝas je mistikeco; oni sentas sin ĉirkaŭvolvita per nekutime emociaj sentoj.

Kaj finfine Jerusalemo, la sanktega urbo. Hejmas tie la ĉefsimboloj de la tri universalaj religioj: de Islamo - La Roka Kupolo sur la Templo Monto, en kiu estas la ŝtono de kie Mohamedo ĉieleniris por sidiĝi apud Alaho (sed tiu ŝtono gravas ankaŭ por hebreoj, ĉar sur ĝi Abrahamo oferis al Dio la vivon de sia filo Isaako); de Hebreismo - La Lamenta Muro ĉe kiu oni preĝas kaj skribas la dezirojn de sia koro sur etajn paperojn, enigotajn en la murajn fendetojn; de Kristanismo - La Tombo Preĝejo, kie la sanktoleada ŝtono, sur kiu kuŝis la korpo de Jesuo, vibrigas emocie ĉiujn kordojn de la koro de l' fideluloj. Unika urbo, kies historio aŭdeblas en la susurado de la vento ĉirkaŭ ties remparoj, kie ĉiu ŝtono havas ion por rakonti pri la vivoj de Homoj kiuj postlasis spurojn neniam plu forigeblajn.

En la ĉirkaŭaĵo de Jerusalemo multegas aliaj gravaj atestaĵoj pri Kristanismo: *Abu Gosh* kaj ties benedikta Monaĥejo; *Ein Kerem* kaj la Preĝejo de la Vizito, en kies kortoj, sur muroj, legeblas la preĝo *Magnificat* en pli ol 50 lingvoj kaj dialektoj, inkluzive de Esperanto; la Olivmonto kaj la Preĝejo Patro Nia, la loko kie Jesuo instruis al siaj disĉiploj tiun preĝon. Ankaŭ ĉi tie surmure la preĝo tradukita en ĉ. 80 lingvojn, inter kiuj ankaŭ la nia.

Sed ni ne nur multon vidis, admiris kaj emociiĝis: ni havis la feliĉan ŝancon aŭskulti nekompareble talentan kaj kleran ĉiĉeronon, kiu kapablis kateni ĉies atenton per sia elokventa klarigado pri ĉio vizitita kaj vidita. Nepras mencii, ke li kompletigis

siajn eksplikojn eĉ per citaĵoj el la Biblio. Lia nomo? Amri Wandel, profesoro pri astrofiziko, prezidanto de E-Ligo en Israelo, estrarano de UEA, membro de Akademio de E-to. Aldonendas ke danke al li mi faris en Israelo la plej belajn kaj interesajn natur-ekskursojn en mia vivo. Unu el miaj preferataj ŝatokupoj estas promenadoj, aŭ - pli bone dirite - marŝadoj kaj esploradoj de naturaj lokoj, pro tio la spertoj tie faritaj en nekonataj pejzaĝoj, gapigantaj ĉiujn pro la eksterordinareco de la koloroj, de la ŝtonaj skulptaĵoj, de la loka flaŭro, ne plu forviŝiĝos el mia memoro.

Wadi Kelt: scenejo rokaĵa, el ĉiuj nuancoj de ruĝa, oranĝa, flava, flaveta koloroj, kies pado estas interrompita de l' apero de eta monaĥejo grek-ortodoksa, alkroĉita al kruta deklivo. Pli sube la rivereto, kies akvoj - neatendite varmegaj - fluas kaj fluas milde gluglante ĝis kaŝiĝi en abunda vegetaĵaro.

Post Jerusalemo atendas min kromaj grandiozaj "aventuroj". Apud Jeriĥo, en Palestino, je -240 m sub marnivelo, la Palaco de *Isham*, el la 8a jc pK, vintra rezidejo de kalifoj omajadaj, kie admireblas mozaikoj el brilaj koloroj, kvazaŭ faritaj ... antaŭ-hieraŭ!

Kumran, gravega loko laŭ historia kaj arkeologia vidpunktoj, situanta okcidente de la Morta Maro: dezerto, eĉ ne herbereto kreskas ĉirkaŭe, blindigas onin ne nur la sunradioj sed ankaŭ la ŝtonoj, malgraŭ ilia pala ruĝet-flava koloro. Tie hebrea grupo, la Esenoj, starigis monaĥejon (150-130 aK) kaj en tia soleco loĝadis por meditado, studado kaj laborado. Eksterordinara malkovro, tute hazarda, estis farita en 1947: en groto de tiea monteto oni eltrovis la famajn Manskribitaĵojn aŭ Rulaĵojn de la Morta Maro, dokumentojn kun nekredible grandaj religia kaj historia valoroj.

Ejn Gedi, la "Fonto de kapridoj", akvoriĉa oazo kaŝita en kanjonoj kiuj elvokas lunan pejzaĝon, karakterizita per freŝaj basenetoj, dancantaj akvofaloj kaj belkreska vegetaĵaro: ĉio ĉi kredigas troviĝi en la Edena Ĝardeno.

La Morta Maro, la sala maro, je -425 metroj sub la mara nivelo. Ĝin oni konis jam en la 4a jc aK: Aristotelo kaj Plinio la maljuna menciis la bonefikajn proprajojn de ĝiaj akvoj. La nabateaj nomadoj elprenadis la viskecan bitumon flosantan sur la surfaco por ĝin vendi al egiptoj, kiuj ĝin utiligis dum la diversaj fazoj de enbalzamigo. Aŭtentika unikaĵo estas la 'naĝado' en - aŭ pli bone dirite - sur la Morta Maro: la korpo iĝas sengravita, malpeza kiel plumo; tute neblas naĝi, ĉu dorse ĉu bruste, la kruroj iras alten, eksterakven - vi povas nur flosi kaj tiel trankvile legi vian preferatan ĵurnalon! Kaj kiel bele glata estas poste la haŭto, inda je karesoj!

Masado: kion diri pri ĝi? Malfacilas trovi taŭgajn vortojn por ĝin priskribi, precipe koncize. Frumate-na suprenirado laŭ la Serpenta Vojo por esti sur la supro antaŭ la sunleviĝo. Kruta ĝi estas, laciga, kruroj tremas precipe kiam la ŝtupetaro iĝas pli kaj pli vertikala, sed tiu strebado estas kompensata, kiam de tempo al tempo por malrapidigi la spiradon, oni ĵetas rigardon al la supro aŭ al la malsupro. Malhelo unue kovras densvuale la pejzaĝon, donante sentojn de atendoj pri io mistera, kaj poste la iom-post-ioma heliĝo malkaŝas subajn kaj

ĉirkaŭajn panoramojn ĉiam novajn por la okuloj pro laŭgrada nuanciĝo de la koloroj donitaj de la lumo. Mi ne scias, kio plej belas: ĉu la kolosa fortikaĵo ĉu la sovaĝa naturo ĉu la subaj panoramoj. Aŭ ĉu oni estas ankaŭ influata de la impresa historio kiu elvenas el ĉiu ŝtono, el ĉiu restinta konstruaĵo, el la spuroj de la romiaj kampadejoj, el la klarigoj de nia ĉiĉerono??? Tiu antikva fortikaĵo, konstruigita de Herodo la Granda inter 40 kaj 30 jaroj aK, troviĝas sur roka plataĵo (300x600-metra) je la alteco de 400 metroj super la Morta Maro, do en tute bona, malfacile konkerebla pozicio. Ĝi enhavis ĉion bezonatan por vivtenado de la loĝantaro, estis tie grandioza sistemo de akvorezervado tre necesa en tiu periode arida regiono, krom domoj, ĉevalejoj, proviantaĵoj, cisternoj por kolekti pluvakvon, ka. Admirblas ankoraŭ nun la tri-nivela palaco de la reĝo staranta sur la norda abisma deklivo de la altebenaĵo. Sekve de lia morto la komplekso estis forlasita, ĝis kiam en la 70a pK, post la konkero far romianoj de Jerusalemo, grupo da hebreaj ribelantoj, 973 zelotoj, rifuĝis tien kaj batalis kontraŭ la hardita Deko Romia Legio dum 3 jaroj. Kiam fine, pro uzado de ramoj (murrupiloj) kaj aliaj militmaŝinoj jam detruantaj la murojn, la sieĝitoj antaŭvidis baldaŭan kapitulacion kaj, por ne fali vivaj en la legianajn manojn kaj iĝi sklavoj, la zelotoj preferis sin mortigi kaj tiel morti kiel liberaj homoj. La militistoj invadis la fortikaĵon kaj en ĝi trovis kaŝitaj nur du virinojn kaj kvin infanojn: ĉirkaŭe la kadavroj de la fieraj hebreoj.

Oni rigardas la tutan strukturon per aliaj okuloj, aŭskultinte la pli detalan rakonton el la buŝo de nia gvidanto, dum oni legas sur lia vizaĝo la doloron kiu, eĉ post paso de 2 000 jaroj, ankoraŭ ne mildiĝis. Malsekiĝas la okuloj de la ĉeestantaro, iuj kaŝas iom honteme la larmojn, silento regas: ĉies pensoj flugas al la tiamaj viktimoj kaj ankaŭ al tiuj nuntempaj, fordonintaj sian vivon defende de propra libero aŭ cele al interhoma paco.

Pluas la vojaĝo: ĉu oni povus imagi kiel plezure estas marŝadi en la freŝetaj akvoj de torenteto dum varmega posttagmezo, halti ĉe etaj basenoj aŭ ĝui ŝprucadon de natura duŝo? Aŭ eniri salgrotton sur kiu imponas la roka statuo de la edzino de Lot? Kaj nun unu el la sep novaj mondo-mirindaĵoj: Petra, en Jordanio! Spektakla kaj mallarĝa interroka breĉo, longa 1600 metrojn, alkondukas al la plej konata monumento: *El Khasneh*. Tiu ŝtona koridoro larĝiĝas kaj mallarĝiĝas: homoj iras kaj iras per levitaj okuloj admirante la gamon de koloroj sur la krutaj parietflankoj. Aŭdiĝas fojfoje la stamfado de la ĉevalaj hufoj kaj la krio atentiga de rajdanto. La sunradioj ludas sur la altaj muroj, kreante longajn ombrojn. Kaj fine tra mallarĝa fendo aperas la rozkolora monda Trezoro. Petra, la nabatea urbo fondita en la 4a jc aK, estis tute elfosita el sabloŝtono, riĉa je fero kiu donas al ĝi tiun apartan ruĝetan koloron. Tie vivis 30 000 personoj, inter kiuj skribistoj kaj inĝenieroj, ĉi lastaj konstruintaj urban kulturan kaj dediĉitan al kulto de l' transmondo. La fasado de la Trezoro estas arta ĉefverko nepriskribebla. Fotoj pri ĝi ekzistas je miloj kaj miloj, sed ĝin admiri en la realo, en ties grandiozeco kaj brilo, estas kiel realigi longe revitan sonĝon. Teatro, loĝdomoj, temploj, tomboj, pavimitaj ŝoseoj, kanaloj: ĉio estis elfosita el tiu sabloŝtono, kohera kaj rezi-

sta sed samtempe facile prilaborebla, kiun karakterizas eksterordinara varieco de koloroj, nuancoj de intensa flavo ĝis fajra ruĝo, aŭ blanko aŭ nigro. Impete oni kuras laŭ padoj, supreniras krutajn deklivojn por vidi kiel eble plej multe. La okuloj pleniĝas je senfinaj vidaĵoj, unu pli bela ol la alia, la menso jam kolapsas pro la troaj emocioj, suno frapadas surkape, mirigas ĉio, mirindas ĉio, admirindas ĉio.

Ja ĉio ĉi sufiĉas por mi: nenio alia plu povos mirigi min dum la cetera vojaĝado. Ho, kia eraro! Ne finiĝas la surprizoj! Jam de du tagoj ni estas en *Eilat*, ĉe la Ruĝa Maro, kaj atendas nin kromaj aventuroj.

La geologia parko *Timna*, en kiu estas unu el la plej antikvaj kuprominejoj en la mondo. Nekredeblaj geologiaj fenomenoj observindas ĝuste ĉi tie. Tuj altiras la atenton grandioza fungo, unueca bloko, plurtavole ruĝa, arte ĉizita de vento kaj akvo. La ĉefaj protagonistoj tamen de la parko estas la kolonoj de Salomono, imponegaj kolonoj el sablo, tiel perfekte kaj harmonie strukturitaj ke oni eĉ povus pensi faritaj de homo. Sed ankaŭ tiuj ĉi estas kreaĵo de la naturo. Apud ili ruinoj de templo dediĉita al diino *Hator*, datiĝanta de la 14 jc aK. Oni supreniras ŝtuparon, je kies fino eblas vidi surrokan gravuraĵon reprezentantan Faraonon Ramseson la 3^{an} kiu oferdonas al la diino *Hator*. Nekredeble!

Ek al Monto Cefaĥot! De tie eblas rigardi al kvar Ŝtatoj: ĉifoje alia pejzaĝo dum la suprenirado. Dezerto, ŝtona dezerto, plantetoj malaltekreskaj, rokaro griza-blanka. Jen la supro! Kia ventego! Alia grandioza panoramo al Israelo, Egiptio, Jordanio kaj Saud-Arabio: per unu sola rigardo ni kaptas kvar landojn!

Rapide alproksimiĝas la lastaj celoj de nia vojaĝo. Nun ekskurso laŭ la Ruĝa Kanjono: se Petra estis ia unikaĵo, tiu ĉi lasta kanjono laŭ kiu ni grimpas, glitas, toboganas, superas mallarĝejoj inter glataj kaj krutaj muroj el ruĝaj, blankaj kaj nigraj ŝtontavoloj, fascinas kaj emocias nin ĉiujn. Tie ĉi denove ne la homo sed la naturo knedis kaj modlis en spirhaltiga maniero, kreante ĉie fabelajn konturojn kaj artaĵojn.

Lunan pejzaĝon ni trapasas antaŭ ol atingi *Mitzpe Ramon*-on, kie la rigardo perdiĝas en vastaj kaj senfinaj spacoj. Escepta spektaklo etendiĝas antaŭ ni: la faŭkego de enorma kratero formiĝinta antaŭ cento da milionoj da jaroj kiam oceano tie kovris la tutan teritorion. Akvo kaj aliaj klimataj fortoj malrapide kaj konstante prilaboris la tuton. La okuloj klopodas ensuĉi kiel eble plej tian belegaĵon, por ke la eksterordinaraj scenoj por ĉiam fiksiĝu en la memoro. Denova interplektaĵo de diversaj geologiaj fenomenoj, sabloŝtonaro plurkolora, vulkana rokaro kaj ... per ĉi lasta ekskurso finiĝas la vojaĝo tra Israelo, mi jam suriras la revenvojon kaj tiam klopodas trankviligi la iom malordajn pensojn kirligantajn en mia kapo.

Ĉu io misa aŭ fuŝa aŭ malagrable okazis dum la tuta periodo? Ho, jes, certe! Ĉu ĉi tio tiom gravas kaj tiom malpozitive influas la memoron pri la travivitaj spertoj? Ho, ne, absolute ne! Kio malbonis, nun fariĝas kialo por ridi kaj ridigi, kaj baldaŭ tiuj memoroj forviŝiĝos per si mem, dume la spuroj pri la impresaj travivaĵoj, faritaj sur padoj naturaj aŭ historiaj, kulturaj aŭ religiaj, artaj aŭ arkeologiaj jam profunde enpenetris la memorujon kaj tie restos por ĉiam. Ĝis iam, Israelo!

Elda

Civitana batalo kontraŭ forĵetado de nutraĵoj

“La homaro havas fundamentan rajton je libereco, egaleco kaj kontentigaj vivkondiĉoj, en medio kie eblu vivi digne kaj bonstate, kaj ĝi maksimume estas responda, antaŭ la ontaj generacioj, pri projektado kaj plibonigado de la medio”.

Tio legeblas je la unua punkto de la deklaro, redaktita en Stokholmo (junie 1972), okaze de la pintkonferenco de la Unuiĝintaj Nacioj pri la homa medio. Por memori pri tiu devo, oni celebras tutmonde je la 5^a de junio la ‘Mondan Tagon de la Medio’, dediĉitan al komuna lukto kontraŭ la nutraĵa forĵetado. Jarcentoj da senregula ekspluatado, malmulta aŭ eĉ nula respekto al la medio, katastrofaj naturaj eventoj de ĉi lastaj jardekoj finfine naskis la konsciiĝon, ke medio kaj ties rimedoj devas esti firme defendataj kaj ke la naturo havas fundamentan rolon en la monda ekonomio.



Enkadre de tio, la Nutraĵa kaj Agrikultura Organizo (FAO - Food and Agriculture Organization), fondita en 1945 en Kebeko, kies devizo estas “Helpante konstrui mondon sen malsato”, fokusigis la rimarkinde gravan problemon, tute tipan de nia moderna, konsumisma vivmaniero, nome la enrubujigon de nutraĵoj. Tiu organizo kalkulis, ke ĉiujare en la mondo estas forĵetataj 1,3 miliardoj da manĝaĵoj, kio egalas al unu triono de la produktitaj nutraĵoj. Kaj tio estas la kvarobla kvanto per kiu oni povus satigi 868 milionojn da personoj, tramonde suferantaj malsaton.

Sed kio okazas en Italio? En esplorado farita de la Instituto *Barilla* (Centro pri nutraĵoj kaj nutrado) oni indikas Eŭropon kaj Nord-Amerikon kiel la kontinentojn plej malŝparemajn. Averaĝa amerikano ĵetas en rubaĵujon, ĉiutage, manĝaĵojn egalajn al 1 334 kilokalorioj, dum eŭropano 720. Sume du okcidentaj civitanoj forĵetas ĉiutage 2 054 kaloriojn: tio estas la meze necesa kaloria kvanto por unu persono. Sed la problemo ne konsistas nur en tiu hontinda kutimo ‘malestimi’ nutraĵojn, ĉar al tio aldoniĝas alligataj konsekvencoj. Kun la kreskadanta konsumemo pliiĝas ankaŭ la kvanto de neeluzitaj manĝaĵoj, krome eĉ pli enradikiĝas tiu sento de malrespekto al la nutraĵoj, al agrikulturo kaj ĉio ĉi kiam duona parto de la homaro suferadas pro malsato. Alia kalkulo tre signifa estis farita: por produkti manĝaĵojn, kiujn poste en la tiel diritaj ‘riĉaj landoj’ oni ĵetas en rubaĵujon, oni foruzas 60 kubmetrojn da akvo (egalajn al 40 000 boteloj el unu kaj duona litro) kaj ekspluatas 832 kvadratajn metrojn da plugebla tereno, kio signifas ke tiu akvo, pri kiu revas milionoj da homoj, precipe infanoj, tra la mondo, estis praktike forĵetita.

Maltrankviligas ankaŭ la situacio en Italio, kie oni respondecas jare pri emisio de 4 milionoj da tunoj de karbona dioksida gaso (CO₂). Tiu malŝparita kvanto egalas al 186 000 tunoj el petrolo, sufiĉaj por hejti 122 000 100-kvadratmetrajn loĝejojn dum unu tuta jaro.

Laŭ mediprogramo de UNO, la tutmonda nutra produktado konsumas 70 procentojn da akvo kaj respondecas pri la 80 procentoj de senarbarigado, kio entute egalas al 30-procentaj gasemisioj kun forceja efiko.

Kampanjo kontraŭ malŝparado de nutraĵoj, iniciatita de la UNO-mediprogramo kaj de NAO, proponis la jenajn dek regulojn:

- 1) Pretigi liston de bezonataj aĉetendaĵoj kaj ĝin strikte sekvi.
- 2) Aĉeti fruktojn eĉ se iom difektitaj.
- 3) Kontrolu atente la limdatojn kaj memori, ke ‘konsumi prefere ene de...’ tute ne signifas, ke post tiu dato la varo iĝas toksa.
- 4) Antaŭ ol aĉeti aliajn manĝaĵojn, konsumi tion kio jam estas en la fridujo.
- 5) Manĝaĵ-restaĵojn kaj aliajn nutraĵojn, proksimajn al limdato, oni povas frostigi, se oni ne sukcesas tuj uzi.
- 6) Ankaŭ en restoracio, mendu nur tion kion vi kapablas elmanĝi.
- 7) Utiligi, se eblas, la restaĵojn kiel sterkaĵon.
- 8) Konsumi unue tiujn aĉetitajn nutraĵojn kiuj plej facile difektiĝas.
- 9) Eltrovi fantaziajn kuirmanierojn por surtabligi la restintaĵojn.
- 10) Informiĝi pri tiuj asocioj, kiuj arigas nutraĵojn por ilin disdoni al bezonantoj.

Ni redonu al nutraĵoj ilian meritatan valoron; ni pensu pri la pena laboro de kulturistoj, kies produktoj - pro subita natura evento kia hajlado aŭ ŝtormo, pro plurmonata pluvo aŭ, male, troa sekeco - povus esti plene detruitaj, kaj oni pensu pri kiom da energio eluzendas dum posta prilaborado en konservadfabrikoj, kiom da forkonsumado de gravaj naturaj rimedoj kiaj akvo, tero, petrolo kaj energio, pri la gasa emisio en la du fazoj, antaŭe por produkti kaj poste por liberiĝi je la rubaĵoj. Ni rezonadu serioze pri ĉiuj ĉi kaj kromaj alligitaj problemoj kaj ekde tuj komencu nian pacan batalon kontraŭ forĵetado de nutraĵoj.

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Eĉ dumsomere mi turmentas vin per ĉi demandoj rilate al kono de la urbo Trieste, sed mi certas, ke fine ja vi estos kontentaj havi pli klarajn ideojn pri ĝia multfaceta historio. Ek al labor’!

- 1) Troviĝas antaŭ la ĉefenirejo de la Urba Ĝardeno en strato *Giulia* (elp. Ĝulja) la monumento dediĉita al *Domenico Rossetti* (Trieste 1774-1842), laŭ kies nomo titoliĝas urbaj strato kaj teatro. Kiujn meritojn li havis por ricevi tiom da rekonoj?
- 2) *Pasquale Revoltella* naskiĝis en Venecio kaj, post la falo de la respubliko en 1797, lia familio translokiĝis al Triesto. Hodiaŭ unu el la plej gravaj triestaj muzeoj havas lian nomon. Kial?
- 3) La fiero de *Lloyd Triestino*, navigkompanio el 1836, la plej granda mara kaj komerca ŝipentrepreno el la tuta historio de Triesto, kaj de la ŝipfarejo Sankta Marko, estis luksa motorŝipo konstruita por rapida linio inter Triesto kaj Egipita Aleksandrio, sed pli poste oni ŝanĝis tiun itineron: ĝi direktiĝis ĉefe al Hindio kaj Ekstrema Oriento. Kiu estis ĝia nomo?
- 4) Kial la ŝipo *Toscana* (Toskanio), kiu estis nek aparte bela aŭ luksa nek interesa, fariĝis objekto de rimarkinda historia intereso?

Respondoj sekvas je 6-a paĝo.

PLIOFTAJ PARONIMOJ

Nia amiko VIGLO pludaŭrigas sendi listojn el sia senfunda puto.

Obsedi	premokupi la psikon	Partiklo	(Ke) tre malgranda peco de materio (pp atomo)
Oscedi	nevole malfermi la buŝon por ekspiri, pro dormemo, malsato, laciĝo aŭ enuo	Partikulo	(In) morfemo laŭsence elektebla en fraz-sintakso
Oferi	donaci al diaĵoj; fordoni ion valoran	Pasi	iri de unu loko al alia; ĉesi; trapasi
Oferti	proponi varon aŭ servon al kliento	Paŝi	meti unu piedon antaŭ la alia, marŝi
Oksalato	<i>ne estas salato de ... 8-oj, sed ...</i> (Ke) salo de oksalata acido	Pasteĉo	spicita viando aŭ fiŝo bakita en tegaĵo de pasto aŭ en terpoto
Oksalido	(Bo) g. (<i>Oksalis</i>) de unu- k plur-jaraj herboj krome de falfoliaj arbustetoj	Pastiĉo	(Be) stilekzerco imitanta manieron de verkisto aŭ muzikisto
Okzalo	(Bo) sp. de rumeĉo (<i>Rumex acetosa</i>)	Pastiso	alkohola drinkaĵo surbaze de anizo
Onikso	(Mi) formo de agato, uzata en juvelarto	Pastro	elektito de eklezia aŭ religia komunumoj por celebri kultajn ceremoniojn
Onisko	(Zo) sp. (<i>Oniscus</i>) de malgrandaj mult-kruraj krustuloj	Pastoro	pastro de unu el la Reformaciaj eklezioj
Oratorio	(Mu) verko, kutime religia, analoga al opero; (Ar) en konstruaĵo, aparta spaco rezervita al eminentaj gastoj elokventa parolanto	Pastelo	(Md) lentoforma medikamento fandiĝonta en la buŝo; lentoforma bombono
Oratoro		Paŝtelo	(Be) kraĵono el pulverigitaj koloriloj k gumo; pentraĵo farita per tiaj kraĵonoj loko kie oni paŝtas
Ordeno	societo de religiuloj ks; honoriga insigno	Paŝtejo	faruno, knedita kun likvo
Ordino	rango de eklezia pastraro	Pasto	paŝtado
Ordo	regula interaranĝo	Paŝto	reprodukti sur diafana materialo desegnon, bildon
Ordono	esprimo de estra volo	Paŭsi	halti momente dum agado
Organo	(An) korpoparto; (Te) ero de maŝino; (In) rimedo de komunikado	Paŭzi	parto de solida korpo; de spaco aŭ tempo; de kompleta tuto, aparato, maŝino; de kolekto, serio; (Be) arta verko
Orgeno	(Mu) blovinstrumento en preĝejo	Peco	(Te) nigra glueca substanco el vegetala rezino
Orelo	(An) organo de aŭdkapablo	Peĉo	(Te) parto de mekanismo, movebla per piedo
Orielo	(Ar) speco de elstara fenestro	Pedalo	malsupera oficisto de preĝejo, lernejo ks, zorganta pri malgravaj taskoj
Oriolo	(Zo) sp. de paseroforma birdo (<i>Oriolus oriolus</i>)	Pedelo	(Zo) sp. de birdo (<i>Picus</i>) el grimpujoj
Oriono	(As) ekvatora konstelacio	Pego	(Zo) sp. de birdo (<i>Pica pica</i>) el korvedoj
Orkideo	(Bo) iu ajn planto el familio de orkidacoj (<i>Orchidaceae</i>)	Pigo	(Zo) g. (<i>Pecten</i>) de maraj moluskoj el duvalvuloj
Orkido	(Bo) g. (<i>Orchis</i>) de plurjaraj herboj; (An) testiko	Pekteno	(Ke) pektata acido (karboksilo) en plantsukoj
Orografio	(Ge) priskribo de montoj	Pektino	(An) unu el la muskoloj de la femuro
Ortografio	laŭnorma skribado de vortoj en difinita lingvo	Pektineo	brita monero
Pago	tio, kion oni pagas; pagado	Penco	formado k kunligado de ideoj
Paĝo	flanko de paperfolio, sur kiu oni skribas aŭ presas	Penso	(Bo) sp. de violo (<i>Viola tricolor, hortensis</i>), ornama, medicina planto
Paĝio	nobela junulo, servanta reĝ(in)on aŭ feŭdan sinjor(in)on	Penseo	sumo regule pagata al eksa laborulo
Palaco	(Ar) granda luksa konstruaĵo	Pensio	(Te) elasta sistemo ebliganta pendigi aparaton, framon
Palato	(An) supera parto de la buŝinterno	Pendigilo	trabaro destinita por mortigi kondamniton
Palto	(Vs) vira vesto	Pendumilo	scio akirita pere de sensorganoj
Pelto	(Vs) speciale preparita felo por fari veston, garnituron ks	Percepto	(Re) obeenda ordono aŭ regulo
Pansi	(Md) protekti k kuraci vundon	Perĉo	(Ik) sp. de fiŝo (<i>Gymnocephalus cernua</i>) el perkedoj
Pensi	formi k kunligi ideojn	Perĉeo	(Ag) malnova mezurunuo de kampoj
Papavo	(Bo) g. (<i>Papaver</i>) de unu- k plur-jaraj herboj	Perko	(Ik) g. (<i>Perca</i>) de fiŝoj el perkedoj
Papaveto	(Bo) ĉiu planto el papavacoj kun skarlate ruĝaj floroj	Perono	(Ar) ekstera ŝtuparo, finiĝanta per larĝa plataĵo, antaŭ la dompordo
Paradizo	edeno, feliĉejo; (Re) loko ĉiela de eterna feliĉo por justuloj post morto	Peroneo	(An) longa subgenua osto de kruro
Paradizeo	(Zo) g. (<i>Paradizea</i>) de paseroformaj birdoj, kun koloraj ornamaj plumoj		
Pario	en Hindio, senkasta malŝatata homo		
Paruo	(Zo) sp. de paseroforma birdo (<i>Parus</i>), malgranda, tre vigla		

Respondoj al demandoj pri Triesto (je 4^a pĝ):

- 1) *D. Rossetti de Scander* estis filo de riĉa triesta proprietulo kaj komercisto kiu estis titolita grafo de imperiestrino *Maria Theresia*. Li studis juron en Vieno kaj en 1800, reveninte al Triesto, enposteniĝis kiel urba prokuroro. Eminentia klerulo, li interesiĝis pri arto, beletro, literaturo, historio, arkeologio kaj botaniko. Kolektadis rarajn manuskriptojn, kodojn, artaĵojn, skizojn kaj librojn. La tutan kolekton li testamentis favore al la Urba Biblioteko. Tiu postlasaĵo konserviĝas en la Muzeo Petrarca k *Piccolomineo* en Triesto kaj reprezentas la duan plej grandan kolektaĵon en la mondo pri atestaĵoj el Humanisma periodo, pro la elstaraj verkoj de Petrarko kaj de episkopo, poste iĝinta Papo Pio la 2-a, *Enea Silvio Piccolomini*. Krome li fondis en 1810 la Societon Minervo, ankoraŭ nun ekzistantan, kies celo estas okupiĝi pri arto, literaturo kaj historio de Triesto, ĉion ĉi disvastigante kaj antaŭenigante.
- 2) Li estis unu el la unuaj akciistoj de Ĝenerala Asekurkompanio kaj administra konsilanto sine de Aŭstria Navigkompanio. *Pasquale Revoltella* engaĝiĝis por malfermo de Suez-kanalo, pro ĝia granda eblo favore al ekonomia disvolviĝo de Triesto. Je sia morto, okazinta en 1869, li heredigis ĉiujn siajn havaĵojn al la urbo. Lia rezidejo, *Vilao Revoltella*, nuntempe gastigas muzeon, en kiu videblas la donacitaj artaĵoj, libroj, gravaj pentraĵoj, krom la origina loĝeja aranĝo.
- 3) Temas pri la motorŝipo *Victoria* (elp. Viktorja) kiun unuanime oni rekonis kiel la plej bela pasaĝera ŝipo farita en la intermilita periodo (1930-31). Pro sia rapideco de po 23,36 mar-mejloj hore ĝi venkis tiam la mondrekordon de motorŝipoj.
- 4) La vaporŝipo *Toskanio* estis farita en 1923 en Germanio, kie ĝi ricevis la nomon *Saarbrücker*. En 1935, la itala estraro decidis ĝin uzi kiel armean transportilon unue por la milito en Etopio kaj poste por tiuj en Hispanio kaj Albanio. Dum la 2-a mondmilito ĝi estis transformita en hospital-ŝipon kaj post la milito por hejmenigi la italajn malliberigitajn de Afriko. En la unuaj tagoj de januaro 1947 ĝi komencis la dramatan transportadon (de *Pula* al Venecio, aŭ al *Ancona* dum entute dek ir- kaj reven-vojaĝoj) de 16 800 rifuĝintoj el Istrio, post la anekso de tiu urbo al Jugoslavio. Sed ĝia elmigra agado ne finiĝis per tio, ĉar en 1954 ĝi alkondukis al Aŭstralio 20 milojn da triestanoj kaj Juli-Venetianoj, kiuj, restintaj sen laborpostenoj post kiam Triesto refariĝis italia urbo, alprenis la decidon elmigri al tiu kontinento.

E-to ĉe Alirprogramoj de RadioUno je la 14h30


Merkrede la 10^{an} de julio: Esperanto-Kongresoj tra la mondo.

Merkrede la 7^{an} de aŭgusto: La Insulo de la Rozoj, alia projekto.

Vendrede la 13^{an} de septembro: 9 minutoj kun...

Ok korvoj - Vigla cerbotiklilo: divenu, divenu...

Sur arbo staras 8 korvoj. Fulmrapide kato forrabas unu korvon por ĝin manĝi. Kiom da korvoj restas sur la arbo?



- ... kaj por ĝui ĉion ĉi, mia kara Alberto, ni abstinadis dum nia tuta vivo de alkoholo, tabako kaj seksumado!!!

Mallonge pri:

★ FESTO ĈE ANITA, dimanĉon la 21^{an} de julio, ekde la 18a horo.

★ Festoj de Kulturoj en Triesto la 31^{an} de aŭgusto kaj la 1^{an} de septembro. TEA prezentos eron el la kroata libro 'La kapreolido Pirgo'.

Priajn informojn petu de Edvige aŭ Elda.

Solvo de la divenludoj
aperintaj en pasinta Bulteno de Viglo

1) Nekredeble!: La hupo

2) Cerbotiklilo: Jen la ses vortoj rezulte de la enŝovo de la silaboj **LI-VE-RI**: **ALI**ĝo - Ba**RI**lo - Bre**VE**to - Ka**LI**fo - **ORI**fico - Se**VE**ro.

Interesa libro kiel premio al solvintoj.

Fermo de la asocia sidejo: julie kaj aŭguste!

Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos
vendrede la 6^{an} de septembro, je la 19^a h.
Bonan someran tempon kaj ĝis septembro!

Dimanĉon la 8^{an} de septembro 2013 Festo de Amikeco sur Monto Forno

Sur la Trilanda Pinto - Dreiländer-eck, renkontiĝos laŭtradicie la esperantistaj grupoj el Aŭstrio, Slovenio kaj Italio. Triestanoj kaj italoj, ne maltrafu ĉi okazon pasigi gajan dimanĉon en esperantista kaj internacia etoso. Rendevuo ĉe la simbolo ekde la 12^a horo. Tie Martin Stuppnig bonvenigos nin ĉiujn!



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Grupa tt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
http://www.esperanto.it/gruppi/ven-taa-fvg.php
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349